# Informilo de SES ( SES 通信 # 180) '1 9 / 2 / 1

## Saluton, SES anoj !

Du skiistoj: Unu novjara salut-karto informis al mi, ke mia amiko T.K. falis en sia ĝardeno kaj rompis kruron. Mi surpriziĝis, eĉ la plej bona sportisto falis en la ĝardeno! Li estis la plej lerta skiisto en nia montogrimpado-klubo. La spuro markita de lia skiado estis tiel bela, ke mi neniam forgesas. Li estis instruisto en supermezlernejoj de Niseko kaj Teine. Li edziĝis al skiistino kaj ĝuadis skiadon sufiĉe en sia vivo.  Sed li loĝas nun en domo de sia filo en Chiba gubernio post li perdis sian edzinon kaj li ne plu skias. Kvankam li ŝajnas kaduka, li instruas go-ludon fervole kiel 5a grado-lerta ludanto.

Miura Yuichiro ekveturis al Monto Akonkagua la duan de Januaro, informaj servoj anoncis. Mi vidis lin en la funebra ceremonio por mia amiko antaŭ unu jaro. Li legis funebran paroladon tie.  Li ŝajnis sufiĉe kadukita, do mi ne pensis, ke li grimpos sur Monto Akonkagua. En mia amika laboratorio de veterinara departemento Miura estis asistanto en 1958. Kiam mi eksperimentis pri funga veneno uzinte bufan koron en la laboratorio, li helpis min, sed li ne ŝajnis feliĉa.  Li poste rezignis la pozicion kaj fariĝis profesia skiisto. Li edziĝis ankaŭ al skiistino. Li fariĝis fama. Mi miris, ke li vere grimpos al la monto kun tiel kaduka korpo. (Mia timo estis mizere trafa.;1/21) (H.Ŝ.)

# SES 総会: 2 月 23 日(土)13：30 かでる 320 室

#児玉広夫さんは病気療養中で施設におられるそうですが、まだまだエスペラントには意欲満々とのことです。